



**PILO-PRESS**

Interencia Inform servo

3a Jarkolekto

Jara abonprezo

20,-- GM

P&K. Nürnberg

819 56 - 851

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 2

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 6/1973 5 feb 73  
Aperas ĉiusemajne

Junaj Esperanto-ambasadoroj



Nürnberg (PP) Pilo-Press jam dufoje raportis pri la Esperanto-iniciato okaze de la brita festivalo "Fanfaro por Eŭropo". Pri la vizito de Petra Engel kaj Henrik Schleicher al Loxford High School raportis du britaj gazetoj: Ilford and Redbridge Pictoria 17 jan kaj The Recorder, 18 jan (kun foto). Ĉar ĝuste informoj pri Esperanto en britaj gazetoj estas gravaj, ni reproduktas la foton kaj artikoleon el The Recorder. La foto montras Petra Engel kaj Henrik Schleicher kun gelernantoj de la lernejo.

## SAYING HELLO

COMMON Market emissaries to England, and Redbridge in particular, couldn't come in better shape than that of Petra Engel or the massive frame of Heinrich Schleicher.

Petra, 17, from Hamburg, and Heinrich, 15, from Copenhagen, spent one day of their two-week stay in this country at Loxford High School. They came as guests of the British Esperanto Association, whose president, Graham Leon-Smith, is senior master and head of the language department at the school.

The pair spent the morning looking around the school and after lunch with the teaching staff helped with both German and Esperanto language classes.

## Süddeutsche Zeitung

### Leute von heute

HELMUT SONNABEND aus Dollbergen, stellvertretender Vorsitzender des Internationalen Esperanto-Lehrerverbandes, nahm an einer Esperanto-Lehrstunde in der slowenischen Schule „Tone Cufar“ in Maribor teil. „Die Verständigung mit den 30 Kindern im Alter von elf Jahren war perfekt“, berichtete der Rektor nach seiner Rückkehr. Internationale Schulversuche mit Esperanto finden zur Zeit an 35 Schulen mit 1107 Schülern in Österreich, Italien, Jugoslawien, Ungarn und Bulgarien statt.

\*\*\*\*\*  
Efika informado

Nürnberg. (PP) Pli kaj pli ofte aperas aktualaj informoj pri Esperanto kaj aktivaj esperantistoj en la prestiĝa germana gazeto "Süddeutsche Zeitung" laŭ la germana eldono de Pilo-Press. La 2 feb 73 la gazeto publikigis la informon pri Rektoro H. Sonnabend kaj lia "eksperimenta" instruado en Maribor (Vd. PP 3/73 p.4)

### Parlamentara grupo kun 30 membroj

Londono (BEA-PS). Lordo Davies de Leek, membro de la supera Ĉambro de la brita parlamento, fariĝis prezidanto de la brita Parlamentara Grupo por Esperanto dum ĝia unua kunsido merkrede la 24-an de januaro 1973 en la brita parlamentojo. Sekretarioj fariĝis la parlamentanoj Ernle Money kaj Lewis Carter-Jones. La Grupo estis formita kun la celo persvadi la registaron instigi la instruadon de Esperanto, speciale en la lernejoj.

Pluraj parlamentanoj esprimis interesigon pri lernado de la lingvo, kaj reprezentanto de Brita Esperantista Asocio aranĝos pri senkosta instruado de Esperanto al la parlamentanoj laŭbezone.

S-ro Raif Markarian, lernejestro, kiu momente klopodas por havigi pli da oficialaj ekzamenoj pri Esperanto, komparis la lernadon, en sia propra lernejo, de Esperanto kun tiu de aliaj lingvoj. Post unu jaro da Esperanto-instruado je po du lecionoj semajne, liaj propraj studentoj posedis aktivan vortkonon de 5000 vortoj. En aliaj lingvoj post kvin jaroj je po kvin lecionoj semajne kaj du pluaj jaroj je po sep lecionoj semajne, multaj havis aktivan vortkonon de apenaŭ pli ol 3000 vortoj.

Dum la kunsido okazis la prelegoj anoncitaj (Vd. PP 4/73). Oni decidis okazigi pluan laborkunsidon post kelkaj semajnoj.

\*\*\*\*\*

### Monda Festivalo kaj Esperanto

Berlino (GDR). En la kadro de la X-a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj, okazonta de la 28-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1973 en Berlino (GDR), okazos ankaŭ specialaj renkontiĝoj pure esperantistaj, kiel jam en antaŭaj jaroj. Inter alie estas planataj: prelegoj, diskutoj - festa akcepto flanke de Centra Laborrondo Esperanto de GDR - programo kun esperanto-filmoj - renkontiĝo kun junaj esperantistoj el GDR.

Laŭ informo de la prezidanto de la preparkomitato por la esperantista renkontiĝo en X-a Festivalo, Detlev Blanke, kaj de Vicprezidanto de TEJO, D-ro Hans Eichhorn, la internacia festivala komitato tre serioze traktas la esperantistan programon kaj i.a. alte estimas la laboron de TEJO. Estus dezirinde, se multaj junaj esperantistoj povus partopreni la festivalon, sed la sola ebleco partopreni estas la aliĝo kiel oficiala membro de la festivala delegacio de la koncerna lando. Alia ebleco por partopreni la festivalon kaj la esperantistan aranĝon ne ekzistas.

\*\*\*\*\*

### Nun kun teletajpilo

Löhne. Hermann Behrmann, la aŭtoro de Esperanto Programita, nun havas teletajpilon kaj povas sendi gravajn informojn al gazetoj tuj telegrafe.

### Kaŝvarbado

Berlino. Malbonan fidon al sia propra nomo havas la germana Ido-societo. En la telefonlibro, parto por komercaj branĉoj, ĝi kaŝiĝas sub Esperanto-adresoj, kaj profitas tiel de la bona marko "Esperanto".

### 663 Esperanto-konkursaĵoj

Varsovio. En la pasinta konkurso de Pola Radio, kiu finiĝis la 31 dec 72, partoprenis entute 8 752 personoj. Inter ili troviĝis 663 respondoj de esperantistoj. Kiel konate la konkurso temis pri internacia paca kunlaboro. Inter la gajnintoj de la ĉefpremioj - dektaga senpaga rondvojaĝo tra Pollando - troviĝas ankaŭ aŭskultanto de la Esperanto-redakcio, nome Werner Pfennig, Anklam, GDR.

Dumtempe okazas nova konkurso de Pola Radio pri la Jaro de Pola Scienco. Vidu PP n-ro 1/paĝo 4. La respondojn oni devas sendi ĝis la 15-a de marto 1973.

### Ĉevalpovaj salutoj

Monte Carlo. De la Rallye Monte-Carlo 1973 sendis elkorajn "tre rapidajn ĉevalpovajn" salutojn al Pilo-Press S-ino Ursula Grattapaglia, Torino, FIAT-interpretistino. Ŝi aldonis la rimarkon, ke oni nepre bezonus internacian lingvon ĉe la Ralio.

### Esperanto en germanaj gazetoj

Hamburger Abendblatt (20.1.73) publikigis artikolon sub la titolo "Esperanto im Cngress Centrum" (Esperanto en la kongresa centro) laŭ informoj de Elsbeth Bormann. En ĝi oni legas i.a., ke la urbestro de Hamburgo, s-ro Schulz, promesis ĉeesti la kongresan inaŭguron 1974. Sekve de la artikolo venis 15 informpetoj pri Esperanto.

Neue Presse kaj Fränkischer Tag, Kronach, (30.1. + 29.1.) aperigis tradukon de la artikolo de Prof. D-ro Ivo Lapenna "Survoje al integriĝo", januara numero de la revuo "Esperanto".

Korekto: En la germanlingva alvoko "Esperanto - Sprache des Sports" ensteliĝis eraro. Linioj 5 + 6 de sube: Anstataŭ "erscheinen wird" devas teksti "verwendet werden"

\*\*\*\*\*

### La Semajno en la Radio

La armistico en Vjetnamo estis ofta temo en la elsendoj de Varsovio, Pekino, kaj ankaŭ en la ĵaŭda elsendo de Zagrebo. Ĝenerale oni esprimis kontenton kaj ĝojon pri la farita interkonsento. En la dimanĉa Esperanto-Ekspreso Varsovio citis ankaŭ el la Pilo-Press-Komentario pri tiu temo en n-ro 5/73. Pekino dediĉis sian tutan vendredan elsendon al la akcepto de Le DUC Tho fare de Mao Zedong kaj fare de Ĉu En Lai en Popola Halo de Pekino. La Pariza interkonsento laŭ la ĉinaj gvidantoj estas granda venko de vjetnama popolo, sed ankaŭ venko de la "usona popolo". Observantoj de ĉinaj aferoj jam ofte povis konstati la diferencigon inter ŝtato kaj popolo. - Berno dissendis merkrede la duan parton de intervjuo kun R. Hauptenthal, ĉi-foje pri la E-literaturo, farita en Centre de Documentation de d'Etude sur la Langue Internationale, (CELI), La Chaux-de-Fonds. - La politikaj temoj de Varsovio koncernis la preparajn interparolojn en Helsinko kaj Vieno. La lunda pli ampleksa Esperanto-Ekspreso enhavis denove multajn rubrikojn. En januaro la E-redakcio ricevis 300 leterojn- Zycie Warszawy publikigis informon pri la korespondaj kursoj de PEA.



# ESPERANTO



lingvo de la sporto

Hallo Freund

Saluton amiko

Hello Friend

Gespäch  
zwischen  
Sportlern

Konversacio  
inter  
Sportuloj

Conversation  
between  
Sportsmen

## Leute von heute

JERZY GRUM, Esperanto-Sprecher des Polnischen Rundfunks in Warschau, soll nach Meinung des Herausgebers des *Deutschen Esperanto-Nachrichtendienstes*, Ludwig Pickel aus Nürnberg, den Titel „Honora Bavaro“ (Ehrenbayer) erhalten. Grum hatte den Beginn der 20. Olympischen Spiele nicht nur mit dem Esperanto-Ausdruck „La Flamo Brulas“ für das Hochdeutsche „die Flamme brennt“ angekündigt, sondern zugleich auch in seiner Rundfunkberichterstattung aus Bayern gemeldet: „O'zündt is.“ Dem Orden der „Esperanto-Ehrenbayern“ gehört bereits der australische Botschafter in Bonn, Ralph Harry, an.

RALPH L. HARRY, australischer Botschafter in Bonn, hat einen olympischen Leitfaden in Esperanto verfaßt. Die Broschüre mit dem Titel „Saluton Amiko“ (Hallo Freunde) enthält alle Fachausdrücke aus 21 Sportdisziplinen in Deutsch, Englisch und Esperanto. „Saluton Amiko“ soll dem Willen des Autors nach in erster Linie dazu dienen, leichter internationale Freundschaften zu schließen.

## ESPERANTO - Sprache des Sports

Anlässlich der Olympischen Spiele in München erschien ein Sport-sprachführer in Esperanto - Deutsch - Englisch

Verfasser ist der australische Botschafter in Bonn, Ralph L. Harry, ein bekannter Esperantist.

Rundfunk und Presse berichtete seinerzeit darüber. Die Olympischen Spiele in München sind vorüber. Die Spiele von 1976 kommen aber bestimmt.

Zuvor jedoch finden die Spiele um die Fußballweltmeisterschaft 1974 in der Bundesrepublik statt.

Soll Esperanto wirklich einmal die Sprache des Sports, des Fußballs werden, so gilt es nun zu handeln.

Alle Sportvereine, alle Sportler sollen Esperanto kennenlernen - durch die Broschüre

„Saluton amiko“

Jeder Esperantist sollte in dieser Aktion mitmachen

durch den Kauf und die Verteilung der Broschüre oder durch Spenden, die zur Herausgabe einer besonderen Broschüre für die Fußballweltmeisterschaft 1974 im Verlag Ludwig Pickel erscheinen wird.

Saluton amiko kostet für diese Aktion nur 3,-- DM

10 Exemplare kosten 20,- DM.

Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113

PSchK Nürnberg 2144 96 - 855 - Stadtparkasse Nürnberg 1.960.149